**ENCIKLOPEDIA VORTARO**
ESPERANTA-GERMANA
ADRESO: DIPL.-ING. WÜSTER
BERLIN NW 87, BACHSTR. 2

TELEFONO: C 5 HANSA 9659

AFERKONDUKANTO:
ALEXANDER SCHWARZ

BERLIN NW 87, BACHSTR. 2 13an de septembro 1930

R. 17

Wü./Schw.

Al

s-ro prof-o G. Peano

Cavoretto-Torino

Italio

Tre estimata sinjoro profesoro!

Mi bone ricevis vian poŝtkarton kaj dankas pro via intereso montrita por la Enciklopedia Vortaro (EV). Bonvolu akcepti la kvaran parton kiel kompenson por la broŝuroj kaj gazetoj, kiujn vi afable sendis al mi.

Koncerne la trian kaj ceterajn partojn: Ekzemplerojn por recenzo sendas la eldonejo. Mi rekomendis al la eldonejo siatempe, sendi al vi la unuan parton por recenzo. Sed la eldonejo ne estis kontenta pri via recenzo (API 1923, Circolare N. 3, pag.7); ĝi opinias, ke la recenzo ne estis sufiĉe ampleksa kaj ne donas klaran imagon pri la libro. (Komparu kontraste la aldonitan recenzon de la plej granda germana ĵurnalo.) Tial la eldonejo ne plu volis sendi al vi la partojn de la EV.

Al mi persone ne estas eble, sendi ekzemplerojn por recenzo, kiujn mi devus pagi mem. Bonvolu kompreni, ke jam la verkado de la EV kostas tre multe. Por ŝpari, mi devis rifuzi eĉ petojn de la Prusa Ŝtata Biblioteko kaj de la Aŭstria Nacia Biblioteko (Esperanto-Muzeo), kiuj deziris ricevi la EV.

Respekte kaj sindone via

Wüster